

Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2000 numero 4-a: septembro / oktobro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

Kulturaj kunvenoj de SES

Orientsvisa semajnfino

Zürich, 23-24-ajn de septembro, Esperanto-Librejo

Akazienstrasse 6, 8034 Zürich

Prelegos Claude Gacond, vespere dancoj kaj teatraĵo

(Vidu la detalan programon sur la paĝoj 2 kaj 3-aj)

Kultura sabato

Genève, 7-an de oktobro, Restoracio Les Cheminots

Rue des Gares 4 (malantaŭ la stacidomo)

Prelegos Uwe Joachim Moritz kaj Alain Favre

(Vidu la detalan programon sur la paĝo 4-a)



Orientsvisa semajnfino

Ostschweizer Wochenende



23/24 septembro 2000

Esperanto-Librejo Zuriko • Akazienstr. 6 • 8034 Zuriko

"Esperanto radiografisch "

(Kursleitung: Claude Gacond.)

Dieser Kurs richtet sich an Esperanto-Lehrer und andere sprachinteressierte Personen. Claude Gacond zeigt an Beispielen auf, was in Lehrmitteln meist fehlt und daher nie richtig vermittelt wird. Der Kurs soll Esperanto-Lehrern einen vertieften Einblick in die Besonderheiten der Sprache vermitteln; aber auch nicht unterrichtende Teilnehmer können viel von diesem Kurs profitieren, um ihre Sprachkenntnisse zu vertiefen. Zum Abschluss des Kurses wird Claude Gacond auch noch einige Übungen mit den Kindern der Primarschule Morgentau vorführen.

"Esperanto radiografie "

(kursgvidanto: Claude Gacond.)

Ĉi-tiu kurso direktas sin al Esperanto-instruistoj kaj aliaj lingve interesataj personoj. Claude Gacond montras per ekzemploj, kio mankas en instruiloj plej ofte kaj tial neniam bone peratas. La kurso peru al Esperanto-instruistoj profundigitan komprenon de la apartaĵoj de la lingvo; sed ankaŭ ne instruantaj partoprenantoj povas multe profiti de ĉi-tiu kurso por profundigi siajn lingvo-konojn. Por konkludi la kurson Claude Gacond montras ankoraŭ kelkajn ekzercojn kun la infanoj de la primarlernejo Matenroso.

Treffen der Esperanto-Aktivisten der deutschen Schweiz

Ziel dieses Treffens soll es sein, die Aktivitäten der Esperantisten und der Esperanto-Klubs in der deutschen Schweiz besser zu koordinieren und die Zusammenarbeit zu vertiefen oder überhaupt erst zu begründen. Natürlich sind zu diesem Treffen auch Freunde aus anderen Landesteilen und aus dem grenznahen Ausland (Süddeutschland, Lichtenstein und Österreich) herzlich willkommen.

Renkontiĝo de la Esperanto-aktivistoj de germana Svislando

La celo de tiu-ĉi renkontiĝo estas kunordigi la aktivecojn de la Esperantistoj kaj Esperanto-kluboĵ en germana Sivsio kaj profundigi la kunlaboron respektive entute ekigi ĝin. Memkompreneble ankaŭ geamikoj el aliaj landopartoj kaj la limproksima eksterlando (suda Germanio, Liĥtenŝtejino kaj Aŭstrio) elkore bonvenas.

Esperanto bei Radio Lora

Das esperanto-sprachige Programm von Radio Lora unter dem Titel "Esperanto sonas poeme" ist über UKW ab dem 17. August 2000 jeden Donnerstag um 15.30 auf 97,5 MHz zu empfangen (über Internet auf <http://www.lora.ch>).

Esperanto en Radio Lora!

La Esperantlingva programo de Loka Radio Lora sub la nomo "Esperanto sonas poeme" kapteblas ek de la 17a de aŭgusto 2000 ĉiŭaude je la 15.30 sur UKO je 97,5 MHz (interrete kaptebla sub <http://www.lora.ch>)

Programm:

Samstag, den 23. September 2000:

12.00 Türöffnung: Begrüssung, Kaffee und Snacks

14.00 - 17.00 1. Kursblock mit Claude Gacond (Pause)

18.00 - 20.00 Fondueplausch mit Salatbuffet

20.00 - 24.00 buntes Abendprogramm:

Theater der Schülerinnen der Primarschule Morgentau

"Die Schäferin un der Wolf"

Lieder vorgetragen von Sitta Föhr

Kubanische Salsa mit Nelida Weidmann

und weitere Darbietungen

Sonntag, den 24. September 2000:

10.00 - 12.00 2. Kursblock mit Claude Gacond

12.30 Spagettiplausch

14.00 Treffen Esperanto-Aktivisten der deutschen Schweiz

Teilnahmegebühr Programm: Fr. 50.-

Mit Essen Fr. 70.-; Nur Essen Fr. 20.-

Programo:

Sabato, la 23an de septembro 2000:

12.00 Pordmalfermo (salutado, kafo kaj manĝetoj)

14.00 - 17.00 1a kursbloko kun Claude Gacond (paŭzo)

18.00 - 20.00 fonduĝuado kun salatbufedo

20.00 - 24.00 bunta vesperprogramo:

Teatraĵo de la lernantoj de la primarlernejo

Matenroso "La ŝfistino kaj la lupo"

Kantoj prezentitaj de Sitta Föhr

Kuba salso kun Nelida Weidmann

kaj aliaj programeroj

Dimanĉo, la 24an de septembro 2000:

10.00 - 12.00 2a kursbloko kun Claude Gacond

12.30 spagedoĝuado

14.00 renkontiĝo de la Esperanto-aktivuloj de germana Svislando

Partopreno: Programo 50.-

Kun manĝoj Fr. 70.-; nur manĝoj Fr. 20.-

Anmeldetalon / Aliĝilo:

(kopiu kaj sendu al: Esperanto-Societo Zuriko, PF 858, CH-8034 Zuriko

fakso 01-2610479 • E-Mail/retpoŝto: info@esperanto.ch)

Familienname/ *Familia nomo:* _____

Vorname/ *Individua nomo:* _____

Adresse/ *Adreso* _____

PLZ-Ort/ *PK-Loko* _____

Telefon/ *telefono* _____

E-Mail/ *Retadreso* _____

Mit meiner Unterschrift melde ich mich verbindlich an obiges Wochenende an. Per mia subskribo mi aliĝas devige al la supremenciita semajnfino. Zahlungen bei Anmeldung auf/ *pagoj ĉe aliĝo al:* Poŝtkonto

Amikaro Esperantisto 90-12622-6

Mi bezonas tranokteblecon (ĉe gesamideanoj, junulargastejo; hotelo) kaj petas rezervadon. Atentu, lokoj ĉe gesamideanoj kaj en junulargastejo estas limigitaj, do frue aliĝu!

Datum+Unterschrift/ *Dato+subskribo* _____

<http://www.esperanto.ch>

Svisa Esperanto-Societo informas 2000 Numero 4 paĝo 3

Kultura sabato de SES

Genève, 7-an de oktobro, Restoracio Les Cheminots
Rue des Gares 4 (malantaŭ la stacidomo)

Programo

- 10h00 Alveno
- 10h30 Kun **Uwe Joachim Moritz**
La situacio de etnaj minoritatoj en Eŭropo – paraleloj kaj diferencoj.
- 11h15 Por eviti naciismon sen fali en la kaptilon de kosmopolitismo : etnismo !
- 12h00 Tagmanĝo CHF 16.- (salato, porkaĵo aŭ fiŝaĵo, farunaĵo)
- 14h30 Minoritistoj kaj esperantistoj : ĉu harmoniigeblaj strebadoj ?
- 15h15 Ĉu ankaŭ demokratio diskriminacias etnajn minoritatojn ?
- 16h00 Paŭzo
- 16h30 Kun **Alain Favre**
Ĉarto de la minoritatoj.
- 17h15 Francprovenca lingvo.
- 18h00 Vespermanĝo
- 20h00 Por tiuj, kiuj ne bezonos longe vojaĝi vespere, Uwe Joachim Moritz prezentos la platdiĉan lingvon.

Aliĝo Sendu vian aliĝilon al Esperanto-Grupo La Stelo, case postale 1888, 1211 Genève, kun indiko pri viaj intencoj tagmanĝi kaj vespermanĝi. Partoprenkotizo CHF 25.- pagebla surloke. (kunhavu ĝustan monsumon)

Prezento de la prelegontoj

Uwe Joachim Moritz 60-jara gimnazia instruisto pri historio, franca kaj kastilia lingvoj, esperantiĝis en 1955. Li interesiĝas pri etnismaj problemoj ekde 1963. Li kunfondis IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, faka asocio de UEA) en Barcelona kun 6 katalunoj. En 1972 li komencis eldoni la gazeton « *Etnismo* ». Germanlingvano, li reproksimiĝis al sia etna lingvo antaŭ pluraj jaroj.

Alain Favre 40-jara instruisto, membro de la komitato IKEL, kunverkis libron pri la historio de Savojo, franclingvano studanta la francprovencan.

Vivo de SES

La Estraro informas

La nova estraro, elektita dum la ĝenerala kunveno en Luzern, kunsidis unuafoje la 17-an de junio en Bern. Unua tasko estis organizi la kunlaboron kaj transpreni la funkciojn. Principe ĉiu estrarano havas funkcion aŭ taskon. La estraro konsistas el jenaj

Membroj kaj funkcioj

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastr. 23, 3063 Ittigen/Bern. Retpoŝto : bgraf.o@bluwin.ch.

Perla MARTINELLI, Vicprezidanto, BP 232, 6830 Chiasso.

Nicole MARGOT, sekretario, Ch. des Lys 4, 1010 Lausanne.

Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds.

Dietrich WEIDMANN, kunlaboras en la informado, PF 301, 8034 Zürich.

Agado 2003

Du subgrupoj okupiĝos pri prioritataj problemoj. Perla MARTINELLI, Elisabeth LAUPER, Claude GACOND kaj Dietrich WEIDMANN ellaboros planon kaj buĝeton por la Agado 2003 (100-

jariĝo de SES kaj de la esperant-iĝo de Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT).

Gazetara servo

Bruno GRAF, Nicole MARGOT, Mireille GROSJEAN, Dietrich WEIDMANN provos restartigi la gazetaran servon, kiu vakas depost jaroj.

Celaro

La estraro adaptis la celaron al la nova trijara mandato. La celaro estas kadro kaj gvidlinio por la agado, ĝi akcelas entreprenemon. Vi trovas la tekston en tiu ĉi numero de nia bulteno.

Deficitoj

La estraro konstatas, ke la ĉiujara deficito estas reduktenda kaj ke la kostoj por la kolektiva abono de « *Literatura Foiro* » fariĝis tro pezaj pro la malkresko de la membraro.

Eblus verŝajne solvi la problemon, se la abono de LF estus fakultativa anstataŭ aŭtomata. Tiel eblus ankaŭ malaltigi la kotizojn por membroj, kiuj ne deziras ricevi la revuon LF, kio estas postulo de Esperanto-

Societo Zürich. La estraro decidis fari enketon pri tiuj demandoj inter la membraro.

Investado de la kapitalo

La estraro ekzamenis pli bonan investadon de la kapitalo de SES. Ĝi decidis, a) aĉeti obligaciojn por sumo de CHF 25'000 ĉe Credit suisse, b) malfermi investokonton ĉe la WIR-banko, c) fermi la ŝpar-kontojn ĉe Credit suisse Zürich kaj Winterthur, d) malfermi poŝtan ĉekokonton por la kurantaj pagoj. La ĝisnuna interezo de 1-2% altiĝos al 3-4%.

Subvencio

La Esperanto-Grupo La Stelo, Genève, petis subvencion por okazigi publikan prelegon kun Claude PIRON la 21-an de septembro sub la titolo « *Les langues : un monde fascinant.* » La estraro decidis disponigi CHF 1000 por lanĉi tiun eventon, ĉar publika agado estas plej necesa.

Reklamtarifo

Nia redaktoro petis, ke la estraro fiksi reklamtarifon por « *SES informas* ». La estraro decidis pri jenaj tarifoj :

Paĝo	Nesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nkomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20

¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

Verkaro de Henri Vatré

La verkaro de Henri VATRE (1908-1998) kuŝas prespreta ĉe la eldonejo Fonto en Brazilo laŭ letero de Reinhard HAUPENTHAL. Laŭŝajne la eldonisto timas la riskon eldoni ĝin. Richard SCHNELLER intencas kolekti antaŭmendojn. Post sciigo pri la libroprezento kaj la kondiĉoj la estraro ekzamenos kiel kunhelpi por ebligi la eldonadon.

Interŝanĝa servo

Dieter ROOKE submetis idearon al la estraro. Li pretas prizorgi interŝanĝan servon pri vid- kaj sonbendoj, gazetoj, ktp. La estraro diskutis diversajn punktojn kaj esperas, ke iom post iom kreskos intereso por tiu servo. Informoj pri tiu oferto aperas en tiu ĉi bulteno.

Venontaj kunsidoj

La proksimaj kunsidoj okazos la 21-an de oktobro 2000 kaj la 3-an de februaro 2001.

Bruno GRAF, prezidanto

Celaro de SES por la periodo 2000-2002

La estrara kunsido de la 17-a de junio en Bern aprobis la ĉi-subajn celojn bazitajn sur la laborplano de UEA.

1. Levi la organizan kaj idean nivelon de SES, precipe junigi kaj fortigi la societon :

- Altigi la membraron je 15% ĝis la jaro 2003.
- Okazigi 1-2 specialajn aranĝojn jare por funkciuloj kaj aktivuloj cele al la aktivigo de la membraro.
- Kunlabori regule kun la lokaj kaj fakaj societoj por stimuli la bazan laboron.
- Malfermi diskuton pri eventuala federigo de ĉiuj esperanto-realaĵoj en Svislando.
- Iniciati komunajn projektojn kun ILEI, JES, KCE, CDELI, por krei sinergiojn.

2. Levi la prestiĝon de esperanto kaj de ties komunumo :

- Restartigi informan servon por la gazetaro kaj por la publikaj instancoj.
- Plani 1-2 publikajn eventojn jare por konatigi esperanton.
- Disponigi modernajn informilojn / varbilojn kaj esplori metodojn por la varbado.

- Plani kaj realigi zorge la agadon 2003 (100-jariĝo de SES kaj de la esperantiĝo de Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT)
- Krei novan bildon kaj perspektivon de esperanto kaj de ties komunumo.

Eŭropa jaro de la lingvoj 2001 Ĉu kun esperanto ?

La Eŭropa Konsilio en Strasbourg lige kun la Eŭropa Unio kaj Unesko deklaris 2001 « eŭropa jaro de la lingvoj ». La iniciato celas promocii la lingvan diversecon kaj stimuli la lernadon de fremdlingvoj.

La Konferenco de la svisaj kantonaj edukdepartementoj kune kun la « Fondumo ch » kunordigas la kampanjon kaj invitis la 23-an de majo al organiza kunveno. Nome de SES mi partoprenis kiel observanto. Krom la invititaj oficialaj instancoj ĉiu interesato estis bonvena. Mi profitis por informiĝi, montri intereson kaj marki nian ekziston.

Kiel diris la organizantoj, la kunlaboremo favore al la kampanjo bedaŭrinde ne estas granda. Interesiĝis tiuj instancoj, kiuj vidas okazon por prezenti la proprajn ideojn. Ekzemple la

kulturaj servoj de la ambasadoj, la asocioj de lingvoinstruistoj, reprezentantoj de minoritataj lingvoj, la projektogrupo portfolio de lingvoj, Babylonia, ktp.

La ĉefaj celoj de la eŭropa jaro de la lingvoj estas :

- Atentigi pri la lingva trezoro en Eŭropo kaj favori la diversajn lingvojn kaj kulturojn.
- Stimuli la eŭropajn civitanojn lerni nombron da lingvoj, ankaŭ la malplej disvastigitajn.
- Lerni fremdajn lingvojn kaj refreŝigi lingvokonojn dum la tuta vivo.

Ĉiuj estas invititaj kontribui al tiu celaro : junuloj, maljunuloj, lingvoinstruistoj, politikistoj, ĵurnalistoj, organizaĵoj, ankaŭ SES. Ni uzu la titolon EUROPA JARO DE LA LINGVOJ 2001 en niaj anoncoj. Eble frapus la imperativa slogano : « Lernu eŭrope, nome esperanton ! »

Mi subtenas tiun celaron, sed ĝi nutras iluzion, postulas multe, tro multe. Kiu povas kaj kapablas lerni kaj regi minimume du fremdlingvojn, kiel proponas la iniciatintoj? Verŝajne nur elita minoritato, dum esperanto estus lernebla de granda plimulto kaj povus faciligi la internacian kompreniĝon radikale.

Bruno GRAF, prezidanto

Kiel elektiĝas la SES-estraro ?

Dum la ĝenerala kunveno en Luzern regis diversaj opinioj kiel procedi en tiu afero. Mi konsultis juriston por interpreti la statuton kaj la procedurajn demandojn.

Nia statuto en artikolo 16 « *Estraro* » diras jenon :

« La Estraro estas la plenuma instanco. Ĝi konsistas el minimume kvin (maksimume sep) elektitoj fare de la Asembleo. Inter ili estas prezidanto (kies voĉo estas decida en kazo de egal-eco), vicprezidanto, sekretario kaj kasisto. La tri ĉefaj lingvo-regionoj de Svislando devas esti reprezentitaj en la Estraro. »

La juristo venis al jenaj konstatoj rilate diferencajn vidpunktojn :

La artikolo 16 estas rudimenta, ne preskribas precizan procedon kaj lasas liberecon. La ĜK rajtas decidi kiel procedi pli detale.

Ne ekzistas statuta devigo, unue voĉdoni pri la membronombro 5, 6 aŭ 7 de la estraro. La asembleo rajtas kompreneble fiksi ĝin.

Kiam prezentiĝas sufiĉe da kandidatoj, ili ne estas aŭtomate elektitaj, sed bezonas ĉiukaze la aprobon de la asembleo.

Okaze de nova elekto de la estraro la asembleo decidu unue pri

proceduraj demandoj, se regas diversaj vidpunktoj.

Bruno GRAF, prezidanto

Kleriĝi informiĝi amuziĝi per nova servo de SES por vid- kaj son-bendoj kaj gazetoj.

Okaze de la ĝenerala kunveno en Luzern SES anoncis novan servon, kiel proponite de mi. La estraro taskis min por kunordigi interŝanĝojn kaj luservojn por esperantaj vid- aŭ son-bendoj kaj gazetoj.

Mi peras vidbendojn de diversnacia deveno pri temoj kiel lernado, informado, turismo, kulturo, scienco, interlingvistiko, esperantologio, ktp. Same mi ludonas sonkasedojn. En mia kolekto troviĝas ekzemple sonbendoj de radio-programoj polaj, jugoslavaj, kubaj, de radio triangulo kaj eĉ de d-ro Arthur BAUR pri la romanĉa lingvo. Petu la listojn pri la vidkaj son-bendoj, ne forgesante aldoni afrankitan koverton A4 kun viaj nomon kaj adreson. Se vi mem posedas vid- aŭ son-bendojn, kiujn vi pretas disponigi al aliaj esperantistoj, bonvolu informi min.

Plie mi cirkuligas aktualajn gazetojn por doni pli riĉan bildon pri tio, kio okazas en esperantujo. Haveblas ekzemple gazetoj de UEA (*Esperanto, Kontakto, TEJO Tutmonde*), gazetoj de landaj asocioj kiel *Esperanto Aktuell* de Germana Esperanto-Asocio, *Sennaciulo* de SAT, *El Popola Ĉinio*, ktp. Sufiĉas sendi poŝtmarkon kun sia adreso, se oni deziras ricevi gazetujon. Pro la cirkulado la gazetoj ne estas presfreŝaj, sed tamen aktualaj.

Momente tiuj servoj estas senkostaj. Oni kovras nur kelkajn sendospezojn.

La peranto atendas viajn dezirojn.

Dieter ROOKE

Äussere Klus 2, 4702 Oensingen

Donacoj

Elisabeth LAUPER, la nova kaskisto de SES, ĝojas aperigi unuan liston da donacoj sumantaj CHF 442.- kun dankoj al la koncernaj malavaruloj.

Donacoj al SES: Pierre DORTHE, Lausanne: 20, Lucienne DOVAT, Renens: 15, Suzanne GERBER, La Chaux-de-Fonds: 50, Walter GIANNINI, Zollikerberg: 5, Ernst GLÄTTLI, Brugg: 5, Renate

HERR, Bern : 30, Werner LÄDERACH, Zürich : 20, Roland MISEREZ, Grand-Lancy : 12, István MOROCZ, Zürich : 45, Ulrich MOSER, La Ferrière : 30, Claude kaj Nicole PIRON, Gland : 50, Alice QUAGLIA, Lausanne : 5, Lilly SCHÄRRER, Langenthal : 50, Paul SCHERRER, Emmenbrücke : 25, Rudolf SCHNEEBELI, Zürich : 5, Madeleine STAKIAN, Onex : 20, Amali VEITH, Aarau : 5, Armin WEIDMANN, Uerikon : 5, Alfred WENGER, Chez-le-Bart : 20.

Donaco por la Agado 2003 : Lisette TESTAZ, Ollon : 25.

Agado 2003

En tiu ĉi numero 2000-4 de « *SES informas* » vi rimarkos enpagilon por la Agado 2003. La redaktoro kaj la kasisto de SES esperas, ke tiu verda papero instigos multajn rivecantojn de nia bulteno malavare apogi tiun agadon, kiu celas digne marki tri centjariĝojn, tiun de la fondo de SES, kaj tiujn de la esperantiĝo de la pioniroj Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT, kies rolo estis ne nur signifega en esperantujo mem, sed ankaŭ en la politika vivo romanda kaj internacia.

Pretiĝas materialo, kiu faciligos la organizon de surstrataj kampanjoj per la vendo de mini-

libroj kaj samtempe la konservon de rilatoj kun ĉiuj kontaktitoj iel markintaj sian ekziston. Ankaŭ verkiĝas dokumentoj, kiuj rememorigos la aktivecon de la menciitaj pioniroj. Ankaŭ estus bone, ke eldoniĝu libro raportanta pri la historio de esperanto en Svislando kaj ke ĝi konsulteblu en la bibliotekoj publikaj kaj lernejoj en tuta Svislando.

Sed tiuj projektoj realiĝos ne nur pro la sindono de verkemuloj, sed ĉefe se en la taŭga momento, kiu alprosimiĝas, nia societo disponos pri la necesaj mon-rimedoj. Tial ni alvokas je malavara apogo per la uzo de la enpagilo menciita.

Claude GACOND, la redaktoro

Grave !

Redakta datlimo

Por *SES informas* 2000-5 (novembro-decembro 2000) la redakta datlimo estas je la 20-a de oktobro 2000.

Por *SES informas* 2001-1 (januaro-februaro 2001) la redakta datlimo estas je la 20-a de decembro 2000.

Movada vivo

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.
Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

Didaktikaj studsabatoj

Raporto

Kurso de Ed Borsboom

La 20-an de majo la prelegado de Ed BORSBOOM grupigis 21 partoprenantojn, kiuj entuziasmiĝis pri la humurplena instrumaniero de la prezidanto de Internacia Esperanto-Instituto (Den Haag, Nederlando).

Ĉiu kursano ricevis foliaron kun specimenaj tekstoj de Spomenka STIMECH, Mauro NERVI, John FRANCIS, Jorge CAMACHO kaj Gonçalo NEVES. La preleganto ilin laŭtvoĉe legis kaj

komentariis, klarigante ties karakterizaĵojn kaj montrante ilian modernecon. Multaj ĉeestantoj decidis pli profunde konatiĝi kun tiuj aktualaj verkistoj nesufiĉe konataj en esperantujo malgraŭ sia talento kaj originala esprimmaniero. Videble la esperanta beletro estas studinda, kaj ni esperas rehavi la viziton de Ed BORSBOOM por daŭrigi tiun interesan malkovron de legindaj verkistoj. Pluraj ĉeestantoj bedaŭris, ke la preleganto ne havis la tempon ankaŭ paroli pri Karolo PICH kaj pluraj aliaj aŭtoroj malbone konataj kaj ofte neĝuste kritikataj pro sia originaleco kaj moderneco.

Okaze de tiu aranĝo Claude GACOND estis honorigita kiel honora kunlaboranto de IEI, per ricevo de bela diplomo.

Venontaj studsabatoj

Claude GACOND senpage helpadas la studentojn kaj instruantojn de esperanto per la regula organizo de didaktikaj studsabatoj okazantaj principe ĉe CDELI la 3-an sabaton de la monato ekde la 10h00 ĝis la 12h45 kaj ekde la 14h15 ĝis la 16h00. Komuna tagmanĝo okazas en najbara italeca restoracio.

Jen la datoj de la venontaj studsabatoj :

oktobre 21 Daŭrigo de la aŭskulto de la prelegetoj prezentitaj de la partoprenantoj en la junia didaktika sabato, cele al kompletigaj gramatikaj kaj stilaj klarigoj. Sekvos serio da paroligaj ludekzercoj, kiuj alportos ne nur novajn instru-ideojn, sed ankaŭ eblojn lertiĝi en la praktiko de esperanto.

La sekvaj dato estas :

Novembre 18 Akiro de bazaj nocioj pri la disvolviĝo de esperanto dum la 20-a jarcento kaj pri la planlingvaj projektoj ĝin konkurinta. Kaj disdono de prelegtemoj por la decembra kaj postaj studsabatoj.

Decembre 16 dediĉita al intimiĝo kun la verkaro de L. L. ZAMENHOF.

Jam nun ni donas datojn de studsabatoj en 2001, por ke la interesoj povu ilin rezervi en sia persona kalendaro :

2001 januare 20, Februare 17, Marte 17, Maje 19, Junie 16.

Ni memorigas, ke la preparlaboro de Claude GACOND estas faciligata, kiam la partoprenantoj sin anoncas per vivsigno telefona, interreta aŭ poŝtkarta.

Donacoj al CDELI

CDELI ricevis arkivaĵojn de David BÜHLMANN kaj Alfred

WENGER, ambaŭ sekve al translokiĝoj.

Kaj sendis artikolojn pri esperanto aŭ kun mencio de lingvaj problemoj Bruno GRAF, Mireille GROSJEAN, Jean-Jacques LAVANCHY kaj Dieter ROOKE. Ni alvokas por ke tiu rikoltado estu pli sistema.

Claude GACOND, la arkivisto

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud Eggenberger, Wurbühlstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64

Raporto

SAEF okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 8-an de aprilo en Luzern. La prezidantino bonvenigis la alvenintajn membrojn kaj la gastojn s-roj Jakob TSCHANZ, prezidanto de Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Svisaj Fervojistoj (VKES) kaj Bruno GRAF, prezidanto de SES.

Apud la kutimaj traktaĵoj la jubilea aranĝo okaze de la 75-jariĝo de SAEF trovis grandan intereson. La propono de la estraro estis unuanime aprobita. La festeno okazos la 7-an de oktobro

2000 en Luzern. La membroj kaj aliaj gastoj intertempe jam estas invititaj.

De la 13-a ĝis la 19-a de majo kvaropo de SAEF-anoj ĉeestis al la Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Budapeŝt. Estis tre fruktodona aranĝo, kiun niaj hungaraj gekolegoj perfekte organizis. Kaj la fakaj kunsidoj kaj la distraj aranĝoj estis tre interesaj kaj altnivelaj. Interalie la SAEF-sekretario Ernst GLÄTTLI prelegis pri la energi-provizado de Svisaj Federaciaj Fervojoj (SFF) kaj pri ties plej moderna altprema elektra centralo.

Gertrud EGGENBERGER

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds.

☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.

<kce.esperanto@bluewin.ch>

Raporto

Novaj organoj

Per «*Heroldo de Esperanto*» 2000-1986 (majo 15) alvenis la sciigo, ke la nova komitato de KCE, elektita de la Asembleo de la 29-a de aprilo, konsistas el

Sonja BRUN, prezidantino, Marc HILBRAND, vicprezidanto kaj David BÜHLMANN, sekretario. La novaj revizoroj estas Francisco PEREZ kaj Giorgio SILFER. La Kultura Konsilio de KCE por la periodo 2000-2004 konsistas el Arthur BAUR, Ivan BUJDOSO, Tomasz CHMIELIK, François DEGOUL, Lucienne DOVAT, Jean-Jacques LAVANCHY, Perla MARTINELLI, Claude PIRON, Nicole PIRON, Giorgio SILFER, Katalin SMIDELIUSZ, Ljubomir TRIFONCHOVSKI, Daniele VITALI kaj Walter ZELAZNY. Claude GACOND estis elimita el ĝi. *ni*

Monatfinoj

La monatfinaj aranĝoj en KCE ĉiam estas eventoj, kaj tiuj de majo kaj junio ne estis esceptoj.

La maja monatfino havis ĉinan etoson. Ges-roj SHEN WANG el Beijing, membroj de Ĉina Akademio de Sciencoj, kapablis montri al ni iom de la ĉina vivo-stilo kaj de la ĉina pensmaniero. Dum la prelegoj de s-ro SHEN Chengru ni aŭdis multon pri la ĉefe teknikaj atingoj de la moderna Ĉinio, dum s-ino WANG Yuchun prelegis kaj instruis pri la saniga influo de la ĉina gimnastiko. Ni lernis, kiel ĉerpi fortojn el la kosmo kaj el la tero per simplaj ekzercoj. Plejan intereson trovis la teoria kaj

praktika prezentoj de la ĉinaj ideogramoj. Ĉiuj ĉeestantoj de post tiam estas fieraj posedantoj de ĉina ideografiaĵo kun bondeziroj por sano, feliĉo kaj longa vivo. Malgraŭ la multaj rimarkablaj diferencoj inter ni eŭropanoj kaj la ĉinaj gastoj ni konsentas kun la konkludaj vortoj de s-ro SHEN : « *Unu mondo, unu lingvo, unu familio.* »

Pli proksima al ni esperantistoj estis la temo de s-ino Zofia BANET-FORNALOWA, kiu dum la junia monاتفino prelegis pri la familio ZAMENHOF. Kiom da detaloj ŝi scias pri la vivo de la multaj membroj de tiu eksterordinara familio ! Inter la multifaceta prezentado, plej kortuŝe ŝi parolis pri la modesta vivo de la gepatroj de L. L. ZAMENHOF kaj pri la suferado de la familianoj dum la persekuto de la judoj en Varsovio ĝis la morto de pluraj en la naziaj koncentrejoj. Elstaris la sorto de Lydia ZAMENHOF, unu el la kuraĝaj virinoj de la familio. La libro de Zofia BANET-FORNALOWA pri la familio Zamenhof, estis tiam ankoraŭ eldonata de LF-koop, kaj ĉiuj malpacience intencis ĝin aĉeti. Tial ni ĝojas anonci, ke ekde julio ĝi estas fine akirebla.

Ĉe ambau monاتفinoj la interkonaj babiladoj kaj distraj

momentoj ne mankis. Ĉu temis pri esperantaj filmoj, esperanta teatraĵo prezentita de Jerzy FORMAL, ĉu pri la enkonduko de eksterlandaj gastoj al la svisa fromaĝa fonduo.

Sonja BRUN

Pri la someraj kursoj

KCE estis "Paradizo" por studemuloj. En la unua kaj dua semajnoj por komencantoj instruis Stano MARCHEK per propra prilaborita metodo. La progresantojn instruis Ljubomir TRIFONCHOVSKI. Kun li la studentoj ekkonis diversajn elstarajn verkistojn legante de ili poemojn, novelojn, eseojn. Kaj el "*Literatura Foiro*" du teatrigoj de intervjuoj redaktitaj de Claude GACOND intimigis nin kun KABE kaj Raymond SCHWARTZ. Ambaŭ estas ege interesaj.

Al la partoprenantoj en la supera grado Stefan MACGILL liveris multajn didaktikajn informojn : kiel instrui samtempe esperanton ekzemple en tendaro por infanoj kaj plenkreskuloj. Stefan MACGILL tre bone aktivigis nin donante al ni hejmtaskojn skribajn. Dum la studhoroj estis situaciaj ekzercoj ĉerpitaj el lia verko "*Tendaraj tagoj*". Ĉiu partoprenanto verkis rolludon laŭ libera temo.

En la dua semajno Giorgio SILFER enkondukis nin en la esperanto-literaturon tra verkoj el la kvin periodoj de ĝia historio. Ni kune analizis poemojn, kiujn ni mem elektis. Ankaŭ li donis al ni hejmtaskojn. Ekzemple ni legis ĉapitrojn el lia verko *“Enkonduko al literatura kritiko”*.

Ambaŭsemajne okazis tuttaga ekskurso. En la unua ni kolektis kuracplantojn, pri kiuj Stano MARCHEK prelegis. La dua vizitigis al ni la akvofalon de la rivero Doubs, kien ni iris piede de KCE. Poste ŝipe ni atingis Les Brenets kaj trajne nian hejmon.

Ĉiuj studhoroj kaj la ekskursoj estis tre bonetosaj. Dudeko da partoprenantoj ĝuis pri ili kaj pri spektado de la kina filmo *“Gadjo dilo”*, de la vidbendoj *“Muzikskatoloj”*; *Kinarto kaj ni*, *“Babel”* kaj *“La Alpoj Svisaj”*. Ni ankaŭ profitis pri la Internacia Folkloro Festivalo en La Chaux-de-Fonds.

Anna LASZAY

Venontaj monاتفinoj

Septembre 30 oktobre 1
Naturamika monاتفino en Tiĉino
kun omaĝo al Cezaro ROSSETTI.

Decembre 16-17 Zamenhofaj Tagoj kun specifa studo pri la vivo kaj verkaro de la fratoj

ZAMENHOF Felikso, Leono, Henriko kaj Aleksandro sub la gvido de Walter ZELAZNY.

Detalaj sciigoj pri tiuj aranĝoj legiĝos oktobre kaj novembre en *« Heroldo de Esperanto »*.

Sonja BRUN

UEA

Universala Esperanto-Asocio

Sonja BRUN, ĉefdelegito kaj kongresperanto por Svislando.
Waldegstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
☎ 041 790 46 40.
<smbrun@freesurf.ch>

Pri la 85-a UK

Per Dieter ROOKE ni ricevis la unuan eĥon el la 85-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Tel-Aviv de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto sub la signo de la temo *« Lingvo kaj kulturo de paco »*. El Svislando aliĝis 13 kongresanoj, inter kiuj troviĝis Dieter ROOKE kaj lia filo. Kaj li rakontas: *En la svisa flughaveno ni jam antaŭspertis, kio nin atendos en la kongresa lando. Speciale trejnita doganisto detal-ege pridemandis nin: « Ĉu vi kunportis bombon aŭ akvopafilon? Kio estas esperanto? Kian*

celon ĝi havas ? » Dum la kongreso Dieter ROOKE migris al la kunsidoj al li interesaj, kaj interalie li estis elektita kiel kaskisto de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO). La tuttaga ekskurso kondukis ilin al la pli kaj pli Morta Maro, kiu sekigadas pro troa uzo de la akvo de la rivero Jordano. Postkongrese Dieter ROOKE feris kun sia filo ĉe la Ruĝa Maro, admirante la submarajn pejzaĝojn okaze de plongadoj.

Grupa vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Restoracio Weiherhof, Neuweilerstr. 107

Septembre 28 : Rakledo ĉe la familio Bérout-Focke je la 19h15. Aliĝo ĝis la 25-a de septembro.

Esperanto-kurso

Esperanto kurso startis ĉe la movado « Aufbau » la 20-an de aprilo kun 6 gelernantoj.

Bern

Esperanto-Societo Bern

Prezidanto: Daniel RUCHTI

Kontaktadreso: Ueli HAENNI, Linckweg 2, Postfach, 3052 Zollikofen.

☎ 031 911 64 72

Kunvenoj: ĉiumonate la unuan mardon je 19h30 en Restoracio «Al Forno», Spitalgasse 37, Bern.

Bedaŭrinde ne venis al ni vivsigno pri la grupa kaj kunsidaj aktivecoj, ĉu signo de dormado ?.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève.

Septembre 5 Babilado.

Septembre 21 je la 20h30 en UNI Mail, 40 boulevard du Pont d'Arve : Conférence publique de Claude Piron : « *Les langues : un monde fascinant !* »

Oktobre 3 monata kunveno.

Oktobre 7 Interregiona Kunveno de SES. (Vidu la pagon 4-an)

Novembre 7 Kun Odette Fregonara : Vojaĝo tra Vietnamio.

Raporto

La monata kunveno de la 6a de junio, kiun partoprenis 9 personoj, estis dediĉita al societaj aferoj. Ĝi disvolviĝis en gaja etoso, same kiel sur la Insulo Rousseau la renkontiĝoj de la 22-a de julio kaj 19-a de aŭgusto, kiuj grupigis po 4 personojn.

Kursoj

Cours d'espéranto pour débutants et avancés (avec cours de rattrapage). Université populaire du Canton de Genève. Inscription : 23, rue du Vuache. ☎ 339 05 00. Durée des cours : d'octobre 2000 à juin 2001. Coût pour l'année : CHF 65.-

Cours de conversation animé par Claude Piron. Tous les jeudis, de 12h00 à 13h00. Maison du quartier, Plainpalais, 1, rue de la Tour, Genève. Le cours commencera le 14 septembre. Ce cours s'adresse à des personnes qui ont acquis les bases de l'espéranto. (Une participation minime aux frais sera demandée.) Renseignements et inscriptions : M. François PERRET, ☎ 320 02 71.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

Septembre 21 Partoprenu la prelegon de Claude PIRON okazonta en Genève.

Oktobre 2 Projekcio de la video-filmoj Mazi de Internacia Esperanto-Instituto kaj de La Familio Bonvolo el Usono, diskuto pri la vidbenda kursmetodiko, pri la telaviva UK kaj pri la venonta UK zagreba.

Novembre 6

Decembre 10 Zamenhofa festo.

Ekskurso al la monto Mont Racine

Dimanĉe 18an de junio okazis la kutima migrado de LES. 9 samideanoj partoprenis ĝin. Estis mirinda tago. La suno brilis kaj la vetero estis tre varma. Je la oka matene ni ektraĵnis al Les Hauts-Geneveys, kie ni retrovis gesinjorojn GACOND kaj DOVAT.

Kun ili ni marŝadis tra paŝtejoj kaj arbaroj dum entute 4 horoj. Ni paŭzis plurfoje por aŭskulti aventurojn kaj rakontojn de Claude GACOND, kiam kiel instruisto li promenis kun sia klaso en tiu montara regiono. Andrée GACOND klarigis al ni pri la renkontitaj floroj. Estis tre amuze kaj interese. Tra herbejoj kaj arbetoj salutante bovinojn ni atingis la montaran restoracion « La Grande Motte », kie ni manĝis bonan ŝinkon kaj frandis bongustajn desertojn. Post tiu ripozo ni retrovis niajn bastonojn por atingi la supron de Mont-Racine, el kie ni ĝuis pri mirinda videjo al la lagoj de Neuchâtel kaj Morat. Poste ni trankvile alvalis ĝis la vilaĝo La Sagne trapasante tre interesan statuan padon, kie ni admiris multajn verkojn el ligno. Dum 20 jaroj la posedanto skulptis arbo-trunkojn en sia arb-aro. Ni vidis bestojn, objektojn, florojn, homojn, ktp. La ŝtormo Lothar detruis bedaŭrinde kelkajn el tiuj skulptaĵojn, sed feliĉe restas ankoraŭ multaj el ili. Ni alvenis en La Sagne, kie ni vespermanĝis en la ĝardeno de la hotelo VON BERGEN. Estis bedaŭrinde jam la fino de la tago. Ni revenis hejmen lacaj, sed feliĉaj. Tial ni dankas tutkore al la organizantoj kaj esperas, ke la venontan jaron

ni estos pli nombraj. Do ĝis revido !

Charlotte Blanc MAILLARD

Infanoj interesitaj

La 3 posttagmezoj de la feri-pasporto dediĉitaj al « *Initiation à l'espéranto* » montriĝis plene sukcesaj. La geknaboj 9-15 jaraj, kiuj ilin partoprenis estis lertaj kaj vigle interesitaj. Kelkaj eĉ esprimis la deziron povi sekvi regulan kurson ĉe François RANDIN.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
☎ 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĝenerale ĉiun trian jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunveno: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (100 m).

Septembre 21 je la 20h00:
Konsiloj de samaritanino kun Margrit SCHERER.

Oktobre 19 je la 14h00:
Edukado de infanoj en esperanto kun Dieter ROOKE.

Novembre 16 je la 14h00:
Kompilo de la programo 2001 kun
Paul SCHERER.

Aldone je ĉiu unua merkredo de
la monato okazas paroliga kun-
veno kun Franz BRÜGGER inter la
14h00 kaj 16h00 en la restoracio
Big Ben, Winkelriedstrasse 39.
Venontaj datoj: septembro 6,
novembro 8, decembro 6.

LES ekskursis

LES-anoj migradas en julio. 11
membroj de Lucerna Esperanto
Societo, spite la pluvon, sabate la
8-an de julio 2000 ekskursis al
Brünig-Hasliberg, kaj – laŭ bele
preparita plano de Louise
BACHMANN – de tie volis iri per
ŝnurvojo al la bone konata Käser-
statt je alteco de 1840 m. La mal-
favora vetero malhelpis atingi la
finan celon kaj la LES-anoj
decidis resti en la restoracio
Wasserwendi je 1160 m, kie ni
bone tagmanĝis kaj pasigis tre
agrablan, amuzan posttagmezon
dankal Franz BRÜGGER, kiu estis
preparinta diversajn ludojn. La
tago preterpasis en amikeca etoso
– unu el ni eĉ lernis kelkajn
bazajn principojn de kartludado.

Menciindas, ke la restoraciestri-
no petis informojn pri la lernado
de esperanto ; pruvo ke ni ne nur
krokodilis !

Se la loka celo de la ekskurso ne
estis atingita, la samvalora celo de
ebleco por amikeca kunestado,
babilado kaj praktiko de esperanto
estis plenumita.

Nome de ĉiuj, koran dankon al
Louise kaj Franz !

Sonja BRUN

Neuchâtel

Studa rondo ĉe CDELI
La Chaux-de-Fonds

Generale je la 2a kaj 4a merkredo de la
monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun
Claude GACOND. Marde okaze de
kongreso la merkredon.

Raporto

En majo kaj junio nia rondo
grupigis tre regule inter 5 kaj 10
studemulojn. Per ludoj, diskutoj,
legaĵoj ĉiuj lertiĝas en la lingva
praktiko.

septembre 27 ĉiu provu al-
porti kaj klarigi ludon, kiun ni
efektivigos dirante en esperanto
ĉion, kion ni faras.

oktobre 25 legado de humor-
aĵoj.

novembre 8 kaj 22

decembre 13 Zamenhofa
festeto kun laŭtleĝo de fragmentoj
el kongresaj paroladoj.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70,
9500 Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato
je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântis-
strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Septembre 6 Raporto pri la
Universala Kongreso.

Oktobre 4 Temo elektota.

Novembre 8 (dua merkredo):
Elektitaj lumbildoj pri svisaj
regionoj kun Ernst GLÄTTLI.

Decembre 6 Nikolaa vespero
kun B. POCHANKE, V. CHAVES-
WALDER kaj L. SENNHAUSER.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH ☎ 01 251 50 25
<info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an lundon de la monato je
la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazien-
strasse 6, 8008 Zürich

Septembre 11 Inform-
vespero en la Esperanto-Librejo
de la 20h00 ĝis la 22h00.

Septembre 23-24 Orient-
svisa semajnfino: (vidu la la
nformojn sur la paĝoj 2 kaj 3-aj)

Oktobre 9 Lernejo
MATENROSO por talentaj
infanoj.

Nova kursprogramo

Esperanto por komencantoj :
Kurso 2000-02. Celo: bazaj konoj.
Ĵaŭdvespere de la 14-a de
septembro ĝis la 23-a de
novembro.

Radio LoRa

La esperantlingva programo
ESPERANTO SONAS POEME
prezentita de Jan Stanislaw
SKORUPSKI sur 97,5 MHz elsend-
iĝas ĉiujaŭde de la 15h30 ĝis la
16h00 ekde la 17-a de aŭgusto. Ĝi
riceveblas ankaŭ interrete sub :
<<http://www.lora.ch>>.

Libroj

Ĵus aperis !

Festlibro por André ALBAULT
De A al B

Per bela kovrilo prezentiĝas la
festlibro por la 75-a naskiĝtago de
d-ro André ALBAULT (1998-05-
14). La editoroj Irimi kaj Reinhard

HAUPENTHAL titolis ĝin « *De A al B* »¹. Kontribuis 18 aŭtoroj.

Pri tiu libro vi certe legos recenzojn de kompetentaj interlingvistoj, esperantologoj kaj aliaj literaturistoj en la esperanta gazetararo. Mi proponas al vi nur nemultajn notojn faritajn dum la legado.

Jen kelkaj eroj el la aŭtobiografio de André ALBAULT. Li naskiĝis kiel filo de profesoro pri matematiko en Reims. Post senzorga infaneco li proprakorpe spertis la ĥaosan tempon de la dua mondmilito. La tuta familio fuĝis de la germanaj invadintoj al suda Francio, revenis Ĉampanjon² kaj la juna studento interesita de superaj matematikoj prepariĝis por eniro de la prestiĝa Politeknika lernejo en la okupita Parizo. Esperanton li estis lerninta jam kiel dekseksjarulo pere de elsendoj de la Franca Radio kaj nun li ankaŭ konatiĝis kun la somnolanta movado kaj allogis lin la Centra Librejo Esperantista : « *Ekstere la milito disvolviĝis. Fremda armeo paradis tra Parizo... Mi legis Zamenhofon kaj liajn ideojn de monda frateco kaj homaranismo... Tiu ideo mondo*

¹ La redakcio : Prononcu : « De albo » aŭ « De ALBAULT ».

² Champagne.

ŝajnis al mi pli reala ol la kruda minaco de la ĉirkaŭanta vivo. »

Fine la situacio en la liceo iĝis neeltenebla pro bombadoj kaj ĝiaj studentoj fuĝis el Parizo kaj rehejmiĝis. La usonanoj liberigis Ĉampanjon kaj la juna ALBAULT rekrutiĝis en la franca armeo !

Tiuj travivaĵoj certe influis la decidon ekstudi medicinon : « *La patrino estis malsana kaj logis min la enurba Medicina Lernejo. Ĝi ŝajnis pli gastema laborejo en suferanta mondo, ol tiu mondo de inĝenieroj, kiuj proponas ĉiam pli da detruanta teĥniko. Mi fariĝos kuracisto kaj sur la paŝoj de ZAMENHOF mi estos okulkuracisto kaj tiel havos okazon uzadi la nociojn pri fiziko kaj optiko lernitajn en Parizo ! »*

Ankoraŭ kiel studento li konatiĝis kun profesoro Ivo LAPENNA kaj en 1950 gajnis oratoran konkurson, kies temo estis : « *Kio estas la paco ?* » Raymond SCHWARTZ en sia internacia kabareto nomis lin flate kaj ŝerce « *Lapennido* ».

Je la sama epoko la familio translokiĝis al Toulouse, kie d-ro ALBAULT malfermis kabineton de oftalmologia kuracisto en malriĉa kvartalo.

En 1951 li edziĝis al Helena HACHIN, kiu instruis esperanton en Rouen : « *Esperanto estis nia*

hejma lingvo kaj sekve ne estis problemo por eduki niajn tri infanojn Bertrando, Rafaela kaj Reĝina, ankaŭ internacilingve. Mi nur notu, ke infanoj ne deziras papagi lingvon nur por plezurigi siajn gepatrojn. Ili preferas paroli por ekscii aferojn, kiuj interesas ilin. 'Ne por sed per'. Ili jam definitive respondis al demando de esperantaj strategiuloj. »

La agado de André ALBAULT por- kaj per-esperanta sur loka, landa kaj internacia niveloj estas certe konata al multaj. Li aktivis en instruista medio kaj fariĝis redaktoro de « *Internacia Pedagogia Revuo* », apartenis al la iniciatintoj de Kastelo Grésillon, li prezidis la landan asocion UFE, la Akademion de Esperanto kaj lia bona kaj praktika « *Vortaro Franca-Esperanto* » (LEGER / ALBAULT) daŭre utilas. Kiel vortaristo li ankaŭ redaktis la medicinan parton de PIV kaj kunlaboris al la « *Granda Vortaro Esperanta-Franca* » de Gaston WARINGHIEN. Reinhard HAUPENTHAL kompilis la bibliografion de André ALBAULT, kiu ampleksas 23 presitajn paĝojn ! Liaj artikoloj aperis en multaj periodaĵoj.

Sur medicina tereno ekde la okdekaj jaroj ALBAULT interesiĝis pri « paralelaj aŭ mildaj medi-

cinaj » : sofrologio (CAYCEDO), homeopatio kaj psikoaŭdiologio (TOMATIS). Li akiris diplomon de sofrologo kaj poste ankaŭ instruis tiun metodon.

Fine li bilancas sian agadon en la esperanta medio : « *Kio fariĝos el nia lingvo ? Lingvo al kiu mi dediĉis miajn plej bonajn jarojn ! La estonteco ne estas certa ! Konceptita por fariĝi la lingvo de ĉiuj Teranoj, ĝi riskas resti ordinara lingvo de internacia grupeto, kiu povos longe transvivi, almenaŭ se ĝi scios progresi kaj konservi sian unuecon. »*

La vorto sub ĉiuj aspektoj ludis gravan rolon en la vivo de André ALBAULT kaj akompanis lin kvazaŭ ruĝa fadeno ekde la oratora konkurso tra interlingvistikaj, esperantologiaj kaj vortaristaj laboroj ĝis la "« kuracanta vorto » de la sofrologo.

Ne eblas al mi priparoli ĉiujn kontribuojn al tiu festlibro. Mi do limigas min precipe je la laboroj, kiuj iel koncernas Svision aŭ svisojn.

Tamen mi ne volas silenti pri la opinio de Marjorie BOULTON rilate esperanton kiel literaturan pontlingvon. Ŝi komparas du tradukojn el SHAKESPEARE de la komedio « *Kiel plaĉas al vi* », tiun de Ivy KELLERMAN (1910) al esperanto kaj tiun de Jules

SUPERVIELLE (1935) al la franca. Dum la unua sekvis precize la originalon, la dua plenumis tiun nefacilan tradukon per poetgenia « vortdanca ĉarmo ». Marjorie BOULTON tamen konkludas, « ke Esperanto pli taŭgas por traduki el ŜEKSPIRO, malgraŭ la pli nuancita vortaro (almenaŭ radikaro kaj riĉega literatura tradiciaro de la franca). Kiel Claude PIRON emfazas en « La bona lingvo » (1998) kaj « Le défi des langues » (1994), la franca estas (kiel aliaj naciaj lingvoj, inter ili la nuntempa angla), multrilate rigida, fiksita... dum Esperanto restas pli permesema, libera, elasta same kiel estis la angla de Ŝekspiro liatempe ».

Ni turnu nin al la « Skizo pri la historio de la instruado de Esperanto en Svislando » far Andy KÜNZLI. Ĝi estas konciza, sed nepre legenda studo por la legantoj de SES informas. Ne eblas ĉi tie resumi la enhavon, ĉar troa kurtigo kripligus la valoran tekston. Por veki vian intereson mi tamen listigas la ĉapitrojn :

Novaj esperoj kun nova lingvo ('Unua Libro' 1887).

La rekomendo de Ernest NAVILLE.

La komenco kun Edouard DUCOMMUN.

La lernolibroj de Jean BOREL kaj Edmond PRIVAT.

La mejloŝtona teorio de René DE SAUSSURE.

Ĝenevo: Edmond PRIVAT kaj Pierre BOVET.

Ligo de Nacioj, PRIVAT, NITOBÉ kaj Gonzague DE REYNOLD.

Svisa Esperanto-Instituto en Bern. La Koordinitaj Esperanto-Kursoj en Zürich.

Grajnoj en Vento en Biel-Bienne. Esperanto-Edukistaro de Svislando.

Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

La « Rika Metodo » de Marc ROHRBACH.

SAEI kaj Svisa ILEI-Sekcio.

Speciale la konkludo estas meditinda. La aŭtoro realisme konstatas la nunan situacion kaj montras la evolueblojn kaj necesajn kondiĉojn por la estonto de esperanto kaj ties instruado en Svisio.

Se por KALOCSAY la « amata ĉevaleto » estis la vort-teorio en esperanto (vidu la kontribuon de Ada CSISZAR), por Henri VATRE ĝi estis la vortstatistikoj. Ĉi-foje la ĝenevano esploris pri la uzado de kelkaj vortkunmetoj. Li elektis cent tekstojn milvortajn libroforme aperintajn de 1907 ĝis 1992 kaj trovis 5,8% kunmetojn en originalaj versaĵoj, 5,3% en originalaj prozaĵoj, 5,2% en proztradukoj kaj 4,9% en verstradukoj,

do meznombre 5,4%. Tio ŝajnas grandaj procentaĵoj (precipe se oni komparas kun aliaj lingvoj, ekzemple la germana supozeble) kaj li diras, « *ke la esplorenda materialo devus esti dekoble pli ampleksa kaj varia* » por tiri sufiĉe signifan konkludon. « *Ĉe originalaj poemoj mi surprizite konstatis ekstremajn diferencojn : TARKONY 102 formoj kaj GABRIELLI 20 formoj. Kaj inter ili super la averaĝo : ADAMSON, AULD, BOULTON, CONTERNO, DRESEN, EMBA, DE KOCK, LISTER, NEWELL, RAGNARSSON, VATRE kaj sub la averaĝo : BAGHY, HEIDE, KALOCSAY, MAURA, MIYAMOTO, PICH, URBANOVA.* » La aŭtoro de la « *Neologisma glosaro* » rimarkis inter la 5396 kunmetoj rikoltitaj centon da originalaj kreaĵoj ne registritaj en niaj vortaroj. Li konkludas : « *Estus interese, post eble dek jaroj, ree esplori la uzadon de la kunmetoj por konstati ties evoluon.* »

Ĉu vi konas d-ron Henri DOR (1835-1912), la « patriarkon de la dua generacio de esperantistoj » ? Ne ? – Henri VEDRINE enketis por vi. – DOR naskiĝis en Vevey, studis medicinon en Zürich, sed ankaŭ en Paris, London, Edinburgh, Praha, Wien, kaj Berlin. Li doktoriĝis pri ginekologia temo en Würzburg,

sed fariĝos altnivela oftalmologo, praktikis sian arton en Vevey kaj iĝis poste profesoro en Bern kaj Lyon. DOR esperantiĝis en 1902, fariĝis prezidanto de la Liona Grupo, kunkreis societon por la propagando de esperanto, kiu nomiĝas hodiaŭ UFE. Li gastigis geedzojn ZAMENHOF, kiuj estis survoje al Barcelona. Iom antaŭe la movado estis endanĝerigita pro la sinteno de la idistoj. En tiu debato DOR varme subtenis la fidelajn esperantistojn. Li estis ankaŭ kunkreanto de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, sed ne povis verki artikolojn por la revuo « *La Kuracisto* », ĉar li mortis en la jaro 1912. Li estis poligloto kaj tamen aktivis en la esperanta movado.

Reinhard HAUPENTHAL prilumas ankoraŭ pli fruan periodon, ol la ĵus pritraktitan, tio estas kiam lanĉiĝis unu post la alia la planlingvoj volapük kaj esperanto. Li specife prezentas la du « *Unua Libro* »-jn de SCHLEYER (1880) kaj ZAMENHOF (1887). La aŭtoro montras la malsamajn startkondiĉojn de ambaŭ projektoj, skizas la lingvokreajn motivojn de la badena pastro kaj de la hebrea okulisto kaj fine atentigas, ke esperanto povis transpreni iujn organizajn kaj ideologiajn

strukturojn de la jam establita volapuka movado.

Johann Martin SCHLEYER estis katolika pastro. Ŝajnas, ke lia ekzemplo provokis la planlingvan kreemon de liaj kolegoj. Unu el ili estis Joseph Alexandre MARCHAND, la kreinto de la lingvo-projekto Dilpok³ (1889). Jean CHAMPION, samlandano de Franche-Comté, provis ekscii iom pli pri Dilpok kaj ĝia aŭtoro. « *Ne estas dubinde ke... (MARCHAND) estis logita de kelkaj trajtoj de Volapük, kiun li versajne praktikis. Li volis asocii al la principaro de Esperanto, kion li pensis inda konsevi el Volapük, kaj tio naskis la projekton Dilpok.* » Li eldonis kompedion (255 p.), seslecian kurson (46 p.) kaj du vortarojn (243 kaj 259 p.). Unu el tiuj verkoj entenas la tradukon de *Paul et Virginie*, fama romano franclingva de Bernardin DE SAINT-PIERRE. CHAMPION tre bone situigas tiun lingvoprojekton en la tiama kunteksto, reliefigas la rolon de ZAMENHOF kaj ĝuste vidas la ĉefajn obstaklojn al la internacia lingvo. Li pravigas la sciencon interlingvistiko per difino de

³ Laŭ komuniko de Claude GACOND, Dilpok laŭvorte signifas « lingvo por la komerco » (dil = komerco, pok = lingvo).

ALBAULT: ĝi celas studi « *la diversajn facetojn de la problemo de internacia lingvo sub ĝia plej ĝenerala aspekto kaj sub ĝia aspekto de planeda lingvo* ».

Laste mi ŝuldas al vi la indikojn pri la temoj pritraktitaj de la aliaj aŭtoroj ne ankoraŭ menciitaj: Donald BROADRIBB (tradukado de hebrea poezio), Probal DASHGUPTO (nomi kaj karakterizi), Claus J. GÜNDEL (reformoj de « novistoj »), Carmel MALLIA (la malta poeto Ruzar BRIFFA), Geraldo MATTOS (elekto de la kazo), Gonçalo NEVES (verboj sen veproj), Baldur RAGNARSSON (la poezio de la skaldoj), Humphrey TONKIN (SHAKESPEARE – interlingvisto), Ebbe VILBORG (la numeraloj en Volapük), Seikō YAMASAKI (aglutineco de lingvoj).

Speciale mi mencias la kontribuon de John WELLS pri supersignoj, trasignoj kaj sub-signoj kun aktualaj konsideroj rilate interreton.

Mi esperas, ke vi atingos la finon de tiu 281-paĝa festlibro same bonhumore kiel Reinhard HAUPENTAL komencis ĝin dirante: « *La blagemon ni ne perdis.* » Tiel estu !

Richard SCHNELLER

Le langage secret de Peter JAMESON

Mi volas paroli pri libro redaktita por dek / dekdu-jaraj geknaboj. Ĝin verkis usonlingve Sylvan ZAFT kun la titolo « *La sekreta lingvo de Peter JAMESON* » Alain DELMOTTE kaj Claude PIRON ĝin tradukis francen. Tiun francan version mi legis.

Temas pri knabo nomata Peter, kiu ekinteresiĝas pri lingvoj. Li iom post iom informiĝas pri tiu temo, ĝis kiam li entuziasmiĝas por iu ajn sekreta lingvo, kiun li povus paroli kun siaj amikoj nekomprenite de la aliaj lernejanoj.

Post kelkaj klopodoj, sen forgesi renkontiĝon kun stranga verdstela maljunulino, li trovas emeritan profesoron pri lingvistiko, kiu konsentas pretigi por ili esperantokurson. Dum la postpaskaj ferioj kelkaj geknaboj vizitas la profesoron ĉiutage por lerni. Fine restas 7 gejunuloj, kiuj reciproke promesas paroli inter si la lingvon ĉiutage en la lernejo dum la paŭzoj, kaj ankaŭ praktiki ĝin telefone kaj skribe per verko de leteroj al kamaradoj.

Ili bone sukcesas, sed tio ne plaĉas al ĉiuj. La direktoro decidas malhelpi paroli esperanton, do la instruistoj kaj la kontraŭuloj daŭre kaj moke

ripetas al niaj amikoj : « *Ĉi tie oni parolas nur la anglan.* »

Peter persistas. Li opinias, ke ili rajtas paroli alian lingvon kaj baraktas por akiri tiun rajton kadre de la lernejo.

Dum la longaj someraj ferioj Peter renkontas hazarde litovon, kiu parolas esperanton. Tiam komenciĝas korespondado inter li kaj niaj amikoj. Aliaj eksterlandaj konatoj de la litova samideano ankaŭ eksendas leterojn..

Fine, pro la persistemo de Peter, kiu rifuzas rezigni pri sia pasio, ĉio reenordiĝas. La grupeto rajtas paroli esperante en la lernejo kaj ankaŭ laŭtlege siajn leterojn kun eksterlandanoj al la klas-kamaradoj.

Jen certe bona donaco por viaj junaj parencoj aŭ amikoj !

Christiane SIXTUS

Atentigo al aĉetemuloj

Eblos akiri ambaŭ librojn ĉe la libro-servo de la studrondo kaj studsabatoj de CDELI.

MORTO

Hans Hunkeler (1920-2000)

La 23-an de aŭgusto mortis Hans HUNKELER, emerita SFF-trajneŝfo en Aarau.

Naskita la 8-an de aprilo 1920, li lernis esperanton menstude en la jaro 1947 per la libro « *Wir lernen Esperanto* » de W. & H. WINGEN. En 1955 li partoprenis du-semajnan kurson en Münchenwiler kaj akiris tie la superan diplomon de SES, subskribitan de William PERRENOUD kaj de Marcel JACCARD.

Ekde sia esperantiĝo ĝis la emeritiĝo en 1983 Hans HUNKELER dediĉis grandan parton de sia libera tempo al la esperanto-movado, precipe sur la kampo de la varbado.

Dum multaj jaroj li instruis esperanton en la fervojista rondo kaj en la komerca lernejo de Aarau; mallonge dirite li senlace propagandis la lingvon internacian inter Basel kaj Chiasso, verkis diversajn priesperantajn artikolojn por la sindikataj gazetoj kaj prizorgis la telekurson « *Esperanto per Post* » de d-ro Arthur BAUR.

En 1959 li iniciatis la Eŭropan Feriosemajnon en Svislando (EEF) kaj organizis ĝin, escepte de 1972, (ekde 1967 kune kun Ernest GLÄTTLI) ĝis 1977, do entute 18-foje.

Al la 64-a Universala Kongreso en Luzern (1979) li servis kiel LKK-revizoro kaj gvidis, kune kun Ernst GLÄTTLI, la oficialan postkongreson, kiu okazis en Interlaken.

Pli ol 25 jarojn Hans HUNKELER metis sin je dispono por diversaj oficoj de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF): 1958-1966 kiel vicprezidanto, 1966-1973 kiel prezidanto kaj ankaŭ redaktoro de la bulteno « *Svisa Fervojisto* ».

Hans HUNKELER estis ne nur membro de SAEF, sed ankaŭ de IFEF, SES kaj UEA. Lian daŭran engaĝiĝon oni honoris en 1967 per bonza FISAIC-medalo.

Ankaŭ lia edzino Ines HUNKELER-PONZIO parolas esperanton kaj ofte akompanis sian edzon al esperanto-aranĝoj; dum iu tempo ankaŭ liaj 3 ge filoj sci povis la lingvon inter nacian.

Al s-ino Ines HUNKELER kaj al la familioj de la tri gefiloj ni sincere kondolencas. Samideano Hans ripozu en paco! Ni konservos vin en bona memoro.

Ernst GLÄTTLI

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

Pri niaj supersignoj

Walter KOBELT atendas senpacience mian respondon al pluraj liaj leteroj, kiujn mi parte citis en « *SES informas* » 1999-5. La koncerna artikolo okazigis tute pravan reagon de Rolf ERNST, kiun mi publikigis en la 1-a numero 2000.

Ĉi-numere, en sia raporto pri la « *Festlibro por André ALBAULT* », Richard SCHNELLER atentigis pri grava teksto: « *Speciale mi mencias la kontribuon de John WELLS pri supersignoj, trasignoj kaj subsignoj kun aktualaj konsideroj rilate interretan.* »

Al la opiniantaj kiel Walter KOBELT, ke esperanto malfacile disvastiĝas pro siaj ĉapelitaj konsonantoj, mi konsilas la trastudon de la menciita prelego de la profesoro pri fonetiko en University College de London. Ĝi konkludiĝas per tiuj ĉi vortoj: « *Vi rimarkos, ke ĉi tiun prelegon, kies teksto abundas je maloftaj kromsignoj, mi sukcesis krei per komputilo kaj ankaŭ presi. Efektive la kromsigna problemo, se ne ĉie solvita,*


almenaŭ estas solvata. La antaŭenmarŝo de la tekniko – presarto, skribmaŝinoj, komputiloj – sinsekve reliefigas kaj solvas tiurilatajn problemojn. Ni nun pasas el epoko, en kiu kromsigno estis problemo, al epoko, en kiu ĉio estas ebla. »

La legantoj de tiu ĉi numero 2000-4 de « *SES informas* » verŝajne rimarkis kelkajn grafikajn ŝanĝojn. Ilin kaŭzis la ekuzo de la nova versio Windows 98 de Microsoft, en kiu mi ne nur trovis en la literaroj « *Arial* » kaj « *Times New Roman* » la tuton de niaj esperantaj literoj, sed ankaŭ la eblon ilin uzi por interretaj dokumentoj.

Tial nia bulteno « *SES informas* » baldaŭ legiĝos interrete en la tuta mondo kun ĉiuj supersignitaj literoj propraj al esperanto. Kaj al la neposedantoj de la menciitaj litertipoj doniĝos la eblo ilin tele-ŝargi en la propran komputilon. Ni trankvile antaŭeniru flegante la fonologian atuton de esperanto.

Claude GACOND, la redakoro

Aldonaĵoj kunsenditaj (2):



ESPERANTO-GRUPO "La Stelo"
Case postale 188
1211 Genève 20

**Deviga aliĝilo al Interregiona Kultura Renkontiĝo en Ĝenevo.
la 7 an de oktobro 2000**

sendenda antaŭ la 30a de septembro al La Stelo

Familia nomo : Persona nomo

Adreso

Poŝtkodo Loĝloko

Telefonnumero nombro da partoprenantoj

Nombro da personoj : por tagmanĝo por vespermanĝo

Empfangsschein / Récépissé / Ricevuta

+ Einzahlung Giro +

+ Versement Virement +

+ Versamento Girata +

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per


Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

Mitteilungen / Communications / Comunicazioni

**CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ**

**CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ**

AGADO 2003



Zugunsten von / En faveur de / A favore di

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862

653677-40-1 4862

**CS ZUERICH-RIGIPLATZ
SVISA ESPERANTO-SOC.**

**CS ZUERICH-RIGIPLATZ
SVISA ESPERANTO-SOC.**

**CASE POSTALE 779
2301 LA CHAUX-DE-FONDS**

**CASE POSTALE 779
2301 LA CHAUX-DE-FONDS**

Konto / Compte / Conto **80-2372-3**

Konto / Compte / Conto **80-2372-3**

Fr. c.

Fr. c.

Two empty boxes for currency amounts, one for Francs (Fr.) and one for Centimes (c.).

Two empty boxes for currency amounts, one for Francs (Fr.) and one for Centimes (c.).

Giro aus Konto
Virement du compte
Girata dal conto

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Einbezahlt von / Versé par / Versato da



Die Annahmestelle
L'office de dépôt
L'ufficio d'accettazione

000000000008620653677400015+ 070486279>

800023723>

PTT 442.03

P + A S/4 97 9000/000